Stary Sącz
(Ószandec)

Defore videblas turo de la klostro.
iam tiel chi tien venis
Kinga la Sankta,
ke el lito de sia edzo la Chastema
virguline pashis
tra morna pordego de l' monahinejo
 konstruigita de shi.
En la ghardeno pomarbo kreskis,
somere la abeloj diligentaj
malproksimen flugis,
 en la korbon nektaron portis .
Fruktoj maturighis,
folioj de kuracherboj klinis
pro la surmonta vento,
laboremaj manoj metis en kamerojn
kion donis la Sinjoro.
Vintro sekvis autunon,
printempe reverdighis la herbejo.
Kaj flugis jaroj,
sulkon farante
sur vizaghon iam knabinan.
Shi petis humile Dion
por fini povi, kion shi devas fari:
klostron, preghejon konstruigis
kaj helpis laboron kamparanan,
regha intelekto.
Shian grizan hararon
kovris Klarissa vualo,
kiam shi mortis
kun nomo de l' Sinjoro sur sensangaj lipoj.
Ekveis la urbo.
Neghblankaj salo-larmoj falis
malalte en la tero,
kaj haltis konsternighante
la sovagha Dunajec.

Arghenta cherko gardas
shiajn restintajn cindrojn en la praa domo
kies bronzpordegon
praa Hungara kaj Pola blazonoj
defendas.

Tradukita de János Ruff